

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 7, nummer 4 (41) januari-februari 2015
Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.
Erkenningsnummer: P808228
V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel
Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 7, n-ro 5 (41) januaro-februaro 2015
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html) .
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

*Nome de estraro de la Limburga Esperanto-
Asocio mi deziras al vi feliĉan novan jaron,
bonan funkciadon de via klubo aŭ grupo kaj
prosperan agadon favore al la disvastigo de
nia bela lingvo*

*Denove mi prezentas al vi naŭ paĝojn da
legaĵo. Certe interesos vin la longa artikolo pri
la varmiĝo de la tero. Sciencistoj pruvas, ke ne
la CO2, kiun produktas la homoj, estas ĝia
kaŭzo, sed la suno, kaj ke tiu varmiĝo estas
normala natura fenomeno, per kio la tero
regule varmiĝas kaj malvarmiĝas.*

*Se vi ŝatas historion, vi certe ŝatos la tre
interesan historion de la bela kaj fama egipta
reĝino Neferteta. Ne temas ĉi tie pri resumo de
romano, t.e. pri la fantazio de iu aŭtoro, sed
pri la veraj faktoj de ŝia vivo kaj ŝia tempo
malkovritaj de la egiptologoj kaj grandparte
bazitaj sur la t.n. leteroj de Amarno, tiel
nomitaj laŭ la nomo de la loko kie oni mal-
kovris en la sablo de la dezerto tutan kolekton
da leteroj sur argiltabuloj.*

Mi deziras al vi agrablan legadon.

Pieter Jan Doumen

Historio de Esperanto en Belgio (4): Geschiedenis van Esperanto in België (4):

Tro facile ni povus konkludi, ke Charles
Lemaire estis unu el la kulpuloj pri la kolo-
niigado de nia iama kolonio kaj la subpremado
de la nigruloj. Nuntempe ni ne plu tiel facile
parolas pri «la bela entrepreno Kongolanda».
Legu jenan eldiron lian, kaj ne forgesu, ke tio
estis verkita antaŭ 1906!

«Unue, antaŭ ol daŭrigi, mi diros, laŭte kaj
kompreneble, ke enpenetri kaj okupi perforte
Mez-Afrikon estis eraro, humane kaj ekono-
mie. Ĉar mi longatempe interrilatis kun pres-


kaŭ ĉiuj popoloj de Mez-Afriko, mi sciiĝis,
ke uzado de armiloj estas neutila naŭfoje el
dek, ne nur neutila, sed ankaŭ malutila, kaj
sekve kriminala.

Tiun krimon la koloniistoj ĉiunaciaj faras,
verŝajne nekonscie. Nur tio senkulpigas ilin.

Sed oni estos devigata uzi aliajn rimedojn,
ĉar homoj, pli kaj pli multaj, komencas certiĝi,
ke negroj estas homoj posedantaj plene la
proprecon de la homaro, sekve ĝiajn rajtojn,
ĝiajn devojn.

Jes, oni kalkulas pli kaj pli multajn homojn
kiuj sukcese utiligas la negrulon sen minaci lin
per pafilo. Koncerne min, mia unua restado en
Afriko konfirmis min, ke tiu enradikiĝinta kre-
do, ke nur perforte eblas ricevi ion de negro,
estas falsa. Hodiaŭ, plezure kaj fiere mi povas
diri, ke, ekvidinte sufiĉe frue mian eraron, mi
suk-cesis plenumi miajn du longajn vojaĝojn
tra Afriko sen pafi eĉ unu solan kartoĉon.

Tio estis grava eksperimento. Ĝi firmigis por
ĉiam mian konvinkon, laŭ kio oni devas trakti
nigrulon, ne kiel oni traktas beston, sed kiel
homon.» (Tra Mez-Afriko, p. 21-a)



Li multe aprezas la nigrulojn, kompatas ilin
kaj certe ne opinias, ke ili estas mallaboremaj!
Por ilustriti tion, kaj ankaŭ por doni plian ideon
pri la stilo kaj lingvo de la aŭtoro, ni citas:

«Sed supozu, ke nia laboro estas finita en ia
difinita loko, kaj ke ree devas ekvojiri la kara-

vano. Vidu laŭ kiu aranĝo marŝadas tiuj kuraĝaj negroj, pri kiuj oni tiel ofte diras multe da malbono.

Jen estas soldatoj kiuj portas siajn armilojn, kartoĉojn kaj sian tutan pakajon, tenatan surdorse per rimeno pasanta surfrunte. Jen estas du portistoj kun duobla ŝarĝo. Tiam virino, kiu portas multepezan korbon plenan de nutraĵo, k.t.p. Jen infano ĝoje portanta ĉirkaŭ dudek kilogramojn dum horoj kaj horoj. La kilometroj sekvas la kilometrojn. Kaj tiuj homoj, kuraĝaj kvankam nigraj, faros la ĉiutagan iradon sen plendo, sen murmuro, kondiĉe tamen ke la blankuloj de la ekspedicio agas juste kun la nigruloj, ke ili liberigas de ŝarĝo la malsanulojn kaj kriplulojn, ke okaze al tiuj ĉi estas donata pendlito; ke oni zorgas pri tio ke la nutraĵo de la nigruloj estu sufiĉa, k.t.p.


Je tiuj kondiĉoj tiuj kuraĝaj idoj de la lando sune heligata kaj varmigata, efektiviĝos ĉiutage marŝadon de dudek, tridek, kvardek kilometrojn, kaj pli. Poste, alveninte al la tendaro, ili malpurigos la lokan elektitan por starigi la tendojn : ili iros ĉerpi akvon por la bano de la blankuloj kaj por ilia kuirejo; ili kolektos hejt-lignaĵon, kaptos fiŝojn aŭ ĉasos, k.t.p.

Kaj nur kiam la blankulo estos komferte loĝigita, nur tiam la 'malbonaj nigruloj' zorgos pri si mem ; ili ekbruligos siajn fajrojn, kiuos simplegan manĝaĵon, kun kiu ili trinkos nur akvon.

Por la nokto ili kuŝigos sin surtere ĉirkaŭ la fajroj, envolvitaj en peco da malbona disŝirita kovrilo, dezirante de la ĉielo nur unu favoron, t.e. ke ne pluvu dum la nokto.

Ĉar kiam ekfalas la pluvo, la 'malbonaj nigruloj' havas nenion por ŝirmi sin kontraŭ ĝi. La eŭropanoj estas ja en bona rifuĝejo sub sia tendo, sur sia komforta kuŝejo; sed kiam pluvas, iliaj nigraj servistoj havas nenian rifuĝejon; sub ia arbo pli densa ol la aliaj ili premas sin unuj kontraŭ la aliajn kiel eble plej por plimalgrandigi la supraĵon de ĉiuj malfeliĉaj malvarmiĝantaj korpoj; kaj dum la tuta nokto, sidantaj ĉirkaŭ la estingiĝintaj fajroj, ili ĝemas senfinan psalmokanton, dirante sian rezignacion de vere malfeliĉaj homoj, kiujn ni tiel facile malŝatas; tamen sen ili ni ne povus marŝi, eĉ dum unu tago, en Mez-Afriko. Malfeliĉuloj, jes, sed tamen kuraĝuloj kaj lertuloj!» (*Tra Mez-Afriko*, p. 33-a kaj 35-a)

Ankaŭ en la kampo de la sentoj li rekonas, ke ankaŭ nigruloj havas ilin, kaj eĉ fizika beleco ne estas la ekskluziva propraĵo de la blankuloj!



«Eble vi demandas vin, ĉu nigra virino estas kapabla kaŭzi tie dramon de ĵaluzeco. Ĝuste tiel, kun via permeso, kiel virino de ia ajn koloro. Plie, senkulpigu mian maltimegon: estas nigrulinoj rigardindaj sen malplezuro. Vidu ekzemple tiun fieran modelon de sudana virino. Ŝia tuta estaĵo estas strange esprima. Rigardu ŝin atente: ŝi ne estas virino kiun oni ordonas, sed kiun oni obeas, ĉar ŝi estas bela kaj nature potencema.

Tiu kies okulo ne estas kutimiĝinta je dikaj lipoj kaj dispremita nazo, eble opinios, ke tiu sudananino estas tre malbela. Laŭvere ŝi estas tre bela, tre favorita de la Sinjoro de la naturo. Kredu, ke ŝia volo povas naski militon inter potencaj gentoj.» (*Tra Mez-Afriko*, p. 45-a)

Lia sincereco kaj honesteco estas klaraj, kaj ne falsitaj de filozofiaj aŭ aliaj antaŭjuĝoj. Tiel li klare atentigas pri la meritoj de la misiistoj, kvankam li estas nekredanto.

«Vere, misiisto, ĉiureligia, estas nuntempe la plej nobla reprezentanto de civilizacio en la kolonioj. Mi deziras rediri, ke mi ne estas kredanto; laŭdante la misiistaron, mi nur obeas la verecon. Mi aldonas, ke la Blankaj Patroj ne estas la solaj kiuj bonfaras en Afriko.» (*Tra Mez-Afriko*, p. 69-a kaj 71-a)

Lia Esperantagado komenciĝis en decembro 1897 kaj daŭris ĝis la Ido-krizo. La nombro de la paroladoj kiujn li faris, estas tre granda. Li agis komence en la Poliglota(j) Cirklo(j), sed ankaŭ en altaj institutoj kaj sciencaj asocioj.

Ni listigos liajn plej gravajn prelegojn.

Menciinda estas lia agado en la kadro de la ekspozicio de la Reĝa Asocio Geografia de Antverpeno kaj lige kun la Delegacio, kio bedaŭrinde kondukis al la doloriga Ido-skismo. Ni tamen ne tro facilanime rigardu la Idistojn

kiel neprajn falsulojn aŭ perfidulojn!


Se oni diras, ke la vivo de Lemaire estis meritplena, oni certe ne troigas. Oni konsciu, ke tiu vivo komenciĝis en la plej malfacilaj cirkonstancoj en mizera vilaĝo de karbomnistoj, kie li jam frue perdis siajn gepatrojn. Nu danke al lia memdisciplino la instruado povis bone okazi kaj konduki al la Armea Altlernejo. Jam frue li akceptis la alvokon disponigi sin por la danĝera vivo en Afriko. Jam frue en sia kariero li konsciis, ke la indiĝenoj estas respektindaj homoj, de kiuj oni povas multon ricevi, se oni estas honesta kaj korekta por ili, kaj li daŭre komunikis tion. Li ne hezitis konfesi, ke li hororis, kiam li relegis tion kion li estis farinta en sia unua Afrika periodo. Lia dekjara, kvankam ofte interrompita propagando por la ideo de internacia lingvo ankaŭ estas pionira, speciale en Belgio, sed ĝi finiĝis en la sakstrato de la Ido-skismo kaj en kompleta seniluziigo. La arkivo de liaj notlibroj, leteroj, raportoj k.a., konservata en la Reĝa Belga Muzeo pri Mez-Afriko (en Tervuren) estas unu el la plej valoraj informfontoj pri la situacio en Mez-Afriko ĉirkaŭ la jaro 1900. Fama restis lia eldiraĵo al la studentoj: bona administranto estas tiu, kiu observas ĉion, rimarkas ĉion, notas ĉion. Lemaire estis fiera pri la rekono de siaj meritoj. Tio klare evidentiĝas el la indikoj sur la titolpaĝoj de la libro *Tra Mez-Afriko* (A Travers l'Afrique centrale), kie, en la franca lingvo 16 honortitoloj estas listigitaj. Tre bona informfonto pri la persono de Charles Lemaire estas lia dulingva libro *Tra Mez-Afriko – A travers l'Afrique centrale*, eldonita en 1906 de la belga presisto kaj Esperanto-aktivulo Antoon Jozef Witteryck. Tiu ĉi 85-paĝa libro, abunde ilustrita per fotoj, kun paralelaj tekstoj en la franca kaj en Esperanto kaj kun kvarpaĝa dulingva enkonduko fare de Hippolyte Sébert, prezentas la tekston de la prelego kiun Lemaire faris en Ĝenevo je la fino de la 2-a Universala Kongreso de Esperanto (la 1-an de septembro en la salono Victoria de la palaco Wilson), kaj al kiu la ĝeneva publiko estis invitita. *Eriko d'Hondt, Petro Desmedt kaj Vikipedio (daŭrigota)*

Novaĵoj el Esperantio

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Germanio: Artikoloj pri Esperanto –

Aktuale mi helpas en la preparado de broŝuro pri Esperanto por geinstruistoj. Ĝia celo,



«Unu lerneja leciono pri Esperanto», estas disponigi materialon, per kiu instruisto povos facile prepari lecionon pri Esperanto.

Por tiu broŝuro mi ĵus ekpreparis kolekton da (neŭtralaj aŭ bonaj) gazetaj artikoloj pri Esperanto en diversaj lingvoj. Ankaŭ radio-raportoj kaj televidaj elsendoj estas bonvenaj ĉe <http://www.esperantoland.org/de/raportoj.html> Enestu ĉefe la lingvoj instruataj (ofte aŭ kelkfoje) en germanaj lernejoj (jam: angla, franca, hispana; hazarde la rumana), do aldoniĝu certe ankoraŭ tekstojn en la dana, nederlanda, itala, pola, rusa, ĉina, eble ankaŭ en aliaj lingvoj.

Mi imagas, ke por ĉiu lingvo estu eble kvin eroj, eble tri tekstoj, unufoje radio- kaj unufoje televidofilmeto.

La ideo estas, ke instruisto de fremda lingvo havu facilan aliron al artikolo, kiu povos esti bazo de traktado de Esperanto en la instruata lingvo.

Aldone enestu ligilo al paĝo kun kolekto da pliaj artikoloj kaj raportoj, se io tia ekzistas.

Ĉu vi povus rekomendi al mi artikolojn en pliaj lingvoj aŭ plibonigi la elekton pri via lingvo? Komprenoble mi ĝojos, se tia internacia kolekto jam ekzistas ankaŭ kun priskribaj tekstoj en aliaj lingvoj; vikia prezento tiucele havas multajn avantaĝojn... (Eble la unuopaj eroj estu tamen en datumbazo/informtenejo, kie tion cetere jam realigis la hispanoj, ekz. **Fout! De hyperlinkverwijzing is ongeldig.** ; Teknike do estus praktike kombini datum-bazon kun vikio...).

Lu Wunsch-Rolshoven

Hungario: *Kreu animacion, ludojn, rakonton -*

Moviĝoj, filmetoj kaj animacioj igas vian rakonton multe pli interesa, multe pli

atentokapta ol la seka teksto. Ankaŭ vi mem povas krei animaciojn kaj ludojn – eĉ per Esperanto-scipovo – pere de la retejo *Scratch* ĉe <http://scratch.mit.edu/> .

Scratch (skreĉo) estas senkosta programilo kaj programlingvo por junuloj, verkita en la fama universitato MIT en Usono. Ekzistas jam pli ol 700.000 projektoj verkitaj per *Scratch*! Oni povas fari programojn per simplaj musaj klakoj kaj per kunmetado de programeroj. Skreĉo ekzistas jam por multaj lingvoj, kaj parte ankaŭ en Esperanto!

Por uzi la Esperantan surfacon alklaku la «terglobo» simbolon supre maldekstre en la redaktilo, kaj elektu vian preferatan lingvon.

- Scratch-hejpaĝo: <http://scratch.mit.edu/>
- Informoj pri la tradukado: http://info.scratch.mit.edu/Translation/Translating_Scratch
Tradukpaĝo: <http://translate.scratch.mit.edu/>

L. Szilvási / Ret-Info

Nederlando: – *Nova varbilo de UEA*

Verŝajne, vi jam rimarkis, ke la Estraro de UEA donas grandan atenton al la pligrandigo de la membraro de UEA. Tio estas komuna tasko por ni ĉiuj. Jam nun oni povas konstati, ke la Estraro ne vokis vane, ĉar la membro-nombro de UEA denove kreskas. Kune kun ni aktivu, por ke en la jaro 2015 ĝi kresku ankorau multe pli forte ol ĉi-jare! Por pli efikigi la varbadon de membroj UEA aperigis novan koloran faldfolion. Vi povas konatiĝi kun ĝi ĉe http://www.uea.org/pdf/UEA_varbilo_2014.pdf

La nova varbilo estas celita por distribuado en Esperanto-kluboj kaj -asocioj kaj en ĉiaspecaj Esperanto-renkontiĝoj, ĉu malgrandaj ĉu grandaj. Ĝi taŭgas tre bone ankaŭ por kunsendo kun landaj Esperanto-revuoj, klubaj bultenoj kaj aliaj gazetoj.

Mi esperas, ke ankaŭ vi aŭ via asocio petos de la CO kvanton de la varbiloj por distribuado. Bonvolu skribi al sekretario@co.uea.org, anoncante la deziratan kvanton kaj la adreson al kiu la CO sendu la varbilojn. Krom la varbilo, vi povos peti ankaŭ kvanton de la membro- aliĝiloj kun la kotizotabelo 2015, t.e. la folio, kiu estis kunsendita kun la oktobra numero de *Esperanto*. Kompreneble vi ne bezonas ple-niĝi la paperan aliĝilon, se vi povas uzi la retan aliĝilon.

Koran dankon pro via kunlaboro kaj multan sukceson !

Osmo Buller,
Ĝenerala direktoro de UEA

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5
B-3940 Hechtel
Tel. 011-73.02.20
Fax 011-73.02.21
hechtel@kbc.be

Pakistano: *Ridetoj, ridoj kaj ridegoj* –

Profesoro pri ekonomio en la Universitato Sokyong de Seulo (Sud-Koreio), So Gilsu vizitis Pakistanon kune kun sia edzino komence de 2014 danke al Esperanto. Li gvidis kursojn en tiu lingvo kaj prelegis. Li povis partopreni i.a. en la Dua Sud-Azia Konferenco de Esperanto en Lahoro de la 25-a ĝis la 28-a de februaro. La akcepto estis varma, gaja kaj entuziasma, kiel atestas la foto-albumo en la korea kaj Esperanto videbla sur lia blogo.

So Gilsu vizitis eĉ Peŝavaron kun profesoro Saeed Ahmed, kvankam tio estis malrekomendita al li pro tio, ke tie la talibanoj konsistigas la plimulton. Li diris: «Ni alvenis en la celita loko, kie amasiĝis multaj homoj, plejgrandparte talibanoj. Kompreneble ne ĉiuj talibanoj estas teroristoj, sed oni admonis nin esti singardaj. Kaj fine, ni estis komplete sieĝataj de ridetoj, ridoj kaj ridegoj.»

Artikolo multe dokumentita estis publikigita en la gazeto «The Nation» de la 4-a de majo 2014 sub la titolo «Global networking through Esperanto» (Tutmonda reto per Esperanto). So Gilsu diris al la ĵurnalisto, ke li neniam estus veninta al Pakistano sen Esperanto.

Henri Masson

Togolando: *AMO 7 en Lomeo, Togolando* –

Ĵus finiĝis la Togolanda Esperanto-Kongreso. La PDF-versio de ĉi tiu komunikado montras grupfoton de tiu aranĝo. Alia foto atestas pri la pretigaj laboroj por la AMO-seminario. Inter la du aranĝoj estas unusemajna spaco, do eblas aserti, ke ĉi tiu estas la unua solstara AMO-seminario ĝis nun. Ĝi havas komunan tagon kun la oka seminario. Jen jam la dua fojo, ke du seminarioj en du kontinentoj okazis la



saman tagon (la alia kazo estis inter Ĉinio kaj Italio).

La oka AMO okazis en Weißwasser, Germanio, kadre de la Junulara Esperanto-Seminaro (JES). Oni prezentis buntan oferton de temoj dum kvar matenoj, malfermaj al ĉiu JESulo.

- Grupformado, projektmastrumado (Veronika Poór, lunde la 29-an de decembro)
- Informado (Peter Balaž, marde, la 30-an de decembro)
- Financa mastrumado (Nico Huurman, merkredede)
- Eblecoj de la nova reto 2.0 (Judit Meyer, merkredede)
- Eksteraj rilatoj (Michael Boris Mandirola, sabate, la 3-an de januaro)

Ni nun laboregas por resumi la komunikojn de la jaro 2014. Resuma tabelo aperos en PDF-versio de la nuna komunkilo. Por nun ĝi kovras nur la unuan jarduonon, kompletigo sekvas en la nova jaro. La komunikoj mem estas pereblaj de la nuna verkanto, ĉu unuopaj komunikoj, ĉu ĉiuj kune, en ZIP-dosiero peza je 7 MB Tiam mi ne alkroĉas ĝin Ni esperas, ke la kolekto fariĝos atingebla tra la retpaĝo.

*Stefan MacGill,
vicprezidanto de UEA*

Ĉu ni respondecas pro la varmiĝo de la klimato? (Zijn wij verantwoordelijk voor de opwarming van het klimaat ?)

Por simpligi la aferon ni ĉeestas la konfrontadon de du teorioj :

- La teorio de la forcejefekto, pro kiu ŝuldas la CO₂, generata de la homo. Ĝin favoras la politikistoj de GIEC kaj la ekologistoj, kiuj volas 'savi la planedon' kaj tiri el ĝi politikan kaj

ekonomian profiton. Multaj sciencistoj oponas tiun teorion.

- La teorio de la efekto de la variaĵoj de la sun-cikloj, defendata de la astrofizikistoj; en tiu kazo la homoj ne kulpas pro la varmiĝo. Tiu ĉi teorio, kiu gajnas ĉiam pli da adeptoj, ne plaĉas al la politikistoj kaj la ekologistoj. Ĝi estas kaŝata al la granda publiko kaj diskreditata de GIEC!

Ĉio estus en ordo, se la konfrontado inter la du teorioj restus sur strikte scienca plano. Mal-feliĉe pasia blindiĝo kaj ekonomiaj aŭ politikaj interesoj miksiĝis en la debaton. La argumentoj ofte estas tre malnoblaj, kaj iuj eĉ proponas buŝumi tiujn kiuj ne akceptas la teorion de la forcejefekto.

La kurvo de la mezumaj temperaturoj de la tero de la jaro 900 ĝis nia tempo publikigita de GIEC en 1995 kaj ĝenerale akceptita, montras:

- Tre varman periodon de 350 jaroj inter la jaroj 1000 kaj 1350 (ĉirkaŭ +6° F) en la mez-epoko. En tiu epoko la vikingoj enmigris Gronlandon.
- Tre malvarman periodon nomatan «malgranda glaciepoko» de 1350 ĝis 1900. La plej malalta temperaturo oni trovas ĉirkaŭ 1650 dum la regado de reĝo Ludoviko XIV en Francio. La rivero Temzo en Anglio estis ĉiujare frostiĝinta kaj oni aranĝis sur ĝi merkatojn kaj aliaj aktivaĵojn.

En 2006 la temperaturo de la planedo restis ankoraŭ multe sub tiu de mezepoka varma periodo.

Koncize dirite, la temperaturo de la tero konsiderinde variis dum la jarcentoj.

Alia kurvo reprezentas la aktivecon de la suno ekde la jaro 1600 ĝis nun. Ĝi tute konincidas kun la antaŭa kurvo. La malgranda glaciepoko estas perfekte eksplikita de la klara plimalaltiĝo de la sunvarmo kaj sunerupcioj. Oni klare vidas, ke la intenseco de la sunerupcioj laŭgrade kreskas ĝis nia epoko, kie ĝi estas maksimuma.

Por la oponantoj de la teorio de la forcejefekto la granda responsulo de la nuna varmiĝo estas la suno, tute kiel en la pasinteco. Por ili la CO₂ elmetata de la homo havas nur neglektindan influon. Pro tio fenomeno ŝuldas la sunerupcioj, kiuj estas videblaj kiel pli brilaj makuloj sur la astro, kiu estas nenio alia ol giganta hidrogenbombo, kies amplekso estas milionfoje pli granda ol tiu de la tero. Ĝia kontinua eksplodado varmigas nin. Ĝi trairas ciklajn variaĵojn de mezume 11 jaroj, t.e. ke ĝi eniras periodon de fortaj erupcioj, tiam tran-

kviliĝas iomete ĝis la sekva periodo de fortaj erupcioj. Sed la amplitudo de tiu sekvoj da erupcioj ne estas konstanta, kaj nuntempe, ekde kelkaj jardekoj nia suno estas la objekto de serio da aparte energiaj pulsoj.

La konkludoj de la astrofizikistoj baziĝas sur sciencaj observoj, kio tute ne estas la kazo por la adeptoj de la forcejefekto. La koincido inter la temperaturoj sur la tero kaj la daŭro de la suncikloj estas impresaj.

La ideo, ke la sunerupcioj influis la klimato de nia tero, ne estas nova. Jam en 1801 la angla astronomo William Herschel, la malkovrinto de la planedo Urano kaj de la infraruĝa radiado, jam rimarkis, ke la prezo de la greno sajnus rekte kontrolata de la nombro de la sunmakuloj (sunerupcioj). Li konstatis, ke la nubkovraĵo de la tero estas pli grava kiam estas malpli da sunerupcioj, kiujn li vidis tra sia teleskopo, kaj do pli da pluvo kaj malpli da greno, kies prezoj tiam plialtiĝis. «Mi inklinas pensi, ke la sunmakuloj devigas nin atendi pli fortan elradiaĵon de varmo kaj pli dolĉajn sezonojn.» Tiu eldiro de Herschel antaŭ la Royal Society de Londono kaŭzis tempeston de ridado.

Du israelaj sciencistoj, Lev A. Pustilnik kaj Gregory Yom Din kontrolis en 2003 kaj 2004, uzante modernajn rimedojn, tiun strangan korilaton inter la prezo de la greno kaj la variaĵo de la suncikloj inter 1249 kaj 1703. Ili analizis ankaŭ la variaĵon de la grenprezo en Usono inter 1900 kaj 2000 kaj malkovris altan korilaton inter la suncikloj kaj la altiĝoj kaj malaltiĝoj de la grenprezoj.

Oni jam delonge scias, ke sunerupcioj, kvankam ili malmulte variigas la intensecon de la sunlumo, kaŭzas la tiel nomatajn magnetajn tempestojn, kiuj akompanas tiujn erupciojn. Tiuj tempestoj deviigas la fluon de la kosmajn radiojn malkovritajn de Viktor Hess en 1912 (premio Nobel 1936), kiuj influas la teron. La dana sciencisto prof. Svensmark malkovris perfektan similecon inter la intenseco de la kosmaj radioj kaj de la nubkovraĵo. Lia raporto aperis en 2006 en la revuo de la Royal Society kaj la Brita Akademio de Sciencoj. Sed la amaskomunikiloj, la ekologistoj, la politikistoj kaj Al Gore tute ne reagis al tiu malkovro. Ili malpravas, ĉar tiu malkovro estas vera novaĵo en la kono de la teroklimato, eĉ se ĝi ne plaĉas al ili, ĉar ĝi permesas ekspliki grandparte, se ne ĉiujn variaĵojn pasintajn, nunajn kaj estontajn, de la tero sen la influo de la CO₂. La britaj sciencistoj Regis G. Harrison kaj David B. Stephenson obtenis la samajn rezultatojn por

Britio kaj tiel pruvis, ke Svensmark pravas. Ankaŭ du hindaj sciencistoj, S. Bhattacharya kaj R. Narisimha, studis la rilaton inter la aktiveco de la suno kaj la musono, kaj malkovris eksterordinaran korilaton de 99,5%! Ankaŭ en Sud-Afriko kvin sciencistoj (W.J.R. Alexander, D.B. Bredenkamp, F. Baily, A. van der Merwe, kaj N. Willemse) atingis similajn rezultatojn. Ankaŭ analizo de la lago Victoria inter 1896 kaj 2005 demontras fortan korilaton inter la nivelo de la lago kaj la nombro de la sunmakuloj.

Aliflanke oni scias, ke la modeloj GCM (Ĝenerala Cirkulada Modelo de la atmosfero), uzataj de la programistoj de GIEC ne kapablas korekte antaŭdiri la musonojn.

Antaŭ tiuj evidentajoj oni povas nur konsili al GIEC ĵeti rigardon sur la suno. Jam pluraj klimatologoj forlasis GIEC, ĉar laŭ ili «la procedo de GIEC estas motivata de antaŭjugo kaj tute ne science fondata».

GIEC (IPCC en la angla) regule publikigas raporton por la politikistoj kun la titolo «Summary for Policymakers». Lastminute du frazoj estis forigitaj el raporto kiu aperis en 1996. Ili estas signifplenaj por la 'honesteco' de GIEC.

1. *Nenia studo citita en tiu ĉi raporto klare montras, ke ni rajtas atribui la observatan klimatsanĝiĝon al la gasoj kaŭzataj de la forcejefekto.*

2. *En tiu momento ekzistas nenia studo kiu pruvas, ke la tuta klimatsanĝiĝo aŭ parto de ĝi rezultas el homaj aktivecoj.*

Bedaŭrinde «*The debate is over*», la debato estas finita, kiel diris la guberniestro de Kalifornio, Arnold Schwarzenegger, kiu tute ne estas specialisto en klimatologio.

Daniel Pignard, el «Science et Foi»

Neferteta, la bela egipta reĝino (4) *(Nefertete, de mooie Egyptische koningin, 4)*

12. En la servo de la morto

La konstruo de la reĝaj tomboj okazis tute sekrete. Nur kelkaj personoj estis inicitaj en ĝi. Apud la enirejo de la Valo de la Reĝoj, apud la nuna loko Der-el-Medine situis vilaĝo de ĉirkaŭ kvindek dometoj, ĉirkaŭita per muro. Tie loĝis la artistoj kaj laboristoj, kiuj dum periodo de ĉirkaŭ 500 jaroj konstruis la tombojn de la faraonoj.

La laboro de tiuj viroj estis severe organizita de la laborĉefo, kiun helpis arkitektoj, ĉeflaboristoj kaj skribistoj. Pentristoj kaj skulptistoj

konsistigis apartan gildon, tute kiel ŝtonhakistoj kaj masonistoj. Dufoje monate malgranda karavano de peze ŝarĝitaj azenoj moviĝis laŭlonge de la mallarĝa pado al tiu sekreta vilaĝo por provizi la laboristojn per akvo kaj nutraĵoj. Ili estis pli bone pagataj ol la aliaj laboristoj. Multaj pagigis sin per nutraĵoj kaj vestaĵoj.

Post ĉirkaŭ sepdek tagoj da sekigo la kadavro de Amenotepo la III-a estis lavita kaj traktita per palmvino, incenso, cedroleo, mirho kaj cinamo. Tiam trunko kaj membroj de la mortinto estis rigide ĉirkaŭvolvitaj per linaj bandaĵoj. Inter la diversaj bandaĝtavoloj ili ŝmiris specon de kaŭĉuksolvo. Oni konis diversajn solvojn, kiuj bone konservis la mumiojn, sed ankaŭ solvojn, per kiuj la bandaĝoj kaj la kadavroj bruliĝis, tiel ke la mumioj nun aspektas nigraj. Dum la balzamado la pastroj preĝis al Osiriso, la dio de la morto.

Post la mumiiga procezo, kiu daŭris preskaŭ tri monatoj, la faraono estis transportita al sia lasta ripozejo. Nur malgranda procesio sekvis la mumion al la Valo de la Reĝoj. La popolo ne povis partopreni en ĝi.

Antaŭ la procesio paŝis pastro vestita nur per leoparda haŭto. Li svingis incensilon dum li laŭte preĝis. Post la ĉefpastro paŝis Teja kun nuda supra korpoparto signe de funebro. Tuj post ŝi iris Neferteta, kiun sekvis la grupo de la aliaj kromedzinoj. Nur tiam sekvis la ok mortpastroj, kiuj portis sur la ŝultroj la keston kun la mumio de la faraono. Post ili venis la resto de la familio, la korteganoj kaj la funkciuloj kun donacoj, kiujn ili volis meti en la tombon de la mortinto. La finon de la procesio konsistigis dancistinoj kaj kantistinoj.

Kiam la procesio atingis la tombon, la virinoj komencis plori kaj lamenti. Sed en la malfermita ŝtona sarkofago jam kuŝis, ĉirkaŭvolvita per bandaĝoj, la mortpastro, nomita Sem, kiu devis esti vekita per la krioj de tri viroj dum longa ceremonio. Tiam tiu ĉi simbole malfermis la buŝon de la mortinto. Nur nun la Ka de la mortinto povis forlasi la korpon.

13. Kruela ofero

Nun Teja simbole ĉirkaŭbrakis lastfoje sian edzon, kun kiu ŝi vivis preskaŭ kvardek jarojn kaj prononcis jenan mortplendon:

«Mi estis via fratino, ho Grandulo, ne forlasu min. Vi estas tiel bela, mia bona patro. Kio nun

ĝenas min esti proksime de vi? Vi, kiu tiel volonte parolis kun mi, vi nun silentas kaj ne plu parolas al mi...»

Dum la tomboservistoj kaj -pastroj sinkigis la mumikeston en la sarkofagon ĉe la lumo de torĉoj, okazis kruela sceno: pastro dehakis per forta bato antaŭkruron de vivanta bovido. Murneptraĵoj en la diversaj tomboj montras bovidon kun tri kruroj.

Ĉe la enirejo de la tombo oferpastroj preparis virbovojn kaj antilopojn por esti oferataj. Oni ligis iliajn kru-rojn kaj ĵetis ilin teren. Du viroj prenis la virbovon ĉe la kornoj kaj provis rompi lian kolon. Finfine pastro malfermis lian kolarterion. La elfluanta sango estis kolektata en grandaj pel-voj. Tiel mortis ĉiuj bestoj.

Per spertaj manoj la buĉistoj distranĉis la bestojn, malfermis la ventron kaj elprenis la koron, kiun ili montris al pastro, kiu priflaris la sangon kaj ekzamenis la karnon de la bestoj kaj proklamis:

«Ĝi estas pura.»

Nun la kruroj de la bestoj estis metitaj en la nun nigre fumantan oferfajron, kaj la tombolaboristoj povis nun fermi la tombon por la eterneco.

Sed tiu eterneco daŭris nur kelkdekojn da jaroj. La dokumentoj de la XX-a dinastio¹ jam mencias, ke la tombo estis malfermita kaj prirabita de tomborabistoj.

Kvincent jaroj post kiam en la Valo de la Reĝoj la unua reĝa tombo estis elhakita, nur du faraonoj ankoraŭ ripozis en sia tombo. Temas pri la tomboj de Amenotepo la II-a kaj Tut-Anĥ-Amono. De la entute 47 faraonaj tomboj en la Valo de la Reĝoj nur 17, el kiuj 4 estis detruitaj, estis konataj sub faraono Ptolomeo la I-a (305-283 a.K.). La greka geografo Strabo male trovis 40 reĝajn tombojn dum lia vojaĝo tra Egipto inter 26 kaj 24 a.K. Ĝis nun oni retrovis 61 tombojn, el kiuj 17 povas esti vizitataj. La plej maljuna tombo estas tiu de Tutmosiso la I-a, prapatro de Amenotepo la III-a, kiu mortis ĉirkaŭ 1500 a.K..

En 1898 la mumio de Amenotepo la III-a estis remalkovrita kun dek aliaj reĝaj mumioj en la tombo de Amenotepo la II-a. Lia mumio ripozas nun en la Egiptologia Muzeo de Kairo.

14. La juna faraono

Ĉar la nova faraono, Amenotepo la IV-a,

¹ Amenotepo la III-a apartenis al la XVIII-a dinastio.

havis nur 12 jarojn, kiam mortis lia patro, li estis ankoraŭ tro juna por regi. Lia patrino Teja, kiu regis jam dek jarojn anstataŭ sia edzo, regis en lia loko. Eĉ dek du jarojn post la morto de sia edzo, ŝi ankoraŭ ĉiam havis la titolon de 'granda edzino de la reĝo, kiu amas ŝin'. Sur murpentraĵo en la tombo de Hujo, ŝia patro, ŝi portas la duoblan kronon, dum Amenotepo la IV-a, kiu poste ŝanĝis sian nomon en Aĥnatonon, kaj Neferteta surhavas nur sim-plajn kapuĉojn kun la Ureo-serpento. Malantaŭ Teja sidas Beketadona kun la teksto: «La vera filino de la faraono». Neferteta sidas malantaŭ Amenotepo. Tiu kaj aliaj bildoj igis la usonan scienciston Velikovsky konkludi, ke Aĥnatonon suferis pro Ojdipuskomplekso kaj havis incestajn rilatojn kun sia patrino, ĉar kiel Beketa-ona povis jam havi ok jarojn, kiam Ameno-tepo la III-a mortis nur kvar jarojn pli frue? Ankaŭ la babilona reĝo Burnaburiaso nomas en letero al Amenotepo Tejan 'la dommastrino'. Post ŝia morto, li lokigis ŝin ne en la tombon de sia patro, sed en sian propran tombon. La konkludo de Velikovsky estas, ke dum la unuaj jaroj de sia edziniĝo Neferteta devis dividi sian edzon kun sia bopatrino. Tamen la Egiptanoj konsideris seksajn rilatojn inter filo kaj patrino kiel incesto.

Pri la la geedziĝo de Amenotepo la IV-a kaj Neferteta ni scias nenion. Tia evento ŝajnis esti sen graveco por la egiptanoj, kiuj tamen estis tre burokrataj kaj religiaj. La virino simple ekloĝiĝis en la domon de la viro, alportante unu trionon de la familio posedaĵo.

Kiam en 1364 a.K. Amenotepo la III-a mortis, la doto de Tusrato por Neferteta ankoraŭ ne alvenis en Tebo. Ĉu la karavano estis prirabita survoje, aŭ ĉu li ne sendis ĝin? Oni rajtas kredi, ke la ruza Tusrato kalkulis je la baldaŭa forpaso de Amenotepo la III-a.

Mallonge post lia morto alvenis en Mitanio la egipta ambasadoro Ĉamaso kun la mesaĝo, ke Amenotepo la IV-a sukcedis al sia patro, Amenotepo la III-a, kaj ke li elektis kiel sian edzinon la junan vidvinon Neferteta. Tiel Neferteta fariĝis de negrava kromedzino, kiu devis esti nur bela, 'granda reĝa edzino'. Kaj kvankam ĉiun paŝon kiun ŝi faris, estis akurate observata de Teja, por ŝi komenciĝis nun la malmultaj belaj jaroj en ŝia ŝanĝiĝema vivo.

Laŭ kalkuloj de W.C. Hayes la unua jaro de la regado de Amenotepo la IV-a komenciĝis post la kutima naŭdektaga funebra periodo, laŭ nia kronologio en aŭgusto de 1364 a.K.

La surtroniĝo de Amenotepo la IV-a kaj lia edziĝo al Neferteta okazis samtempe, aŭ tiuj datoj estis proksimaj unu al la alia. Neniu dokumento mencias la precizan daton.

Jam en la dua jaro (1362 a.K.) naskiĝis la unua filino, Meritadona (amata de Atono). La deksesjara 'granda reĝa edzino' vivis kiel decas al reĝino de granda imperio.

Ne estas sciata, kio okazis al la granda haremo de Amenotepo la III-a. Ekzistas nur unu mencio pri tio, ke ankaŭ Amenotepo la IV-a havis haremon. En letero al reĝo Burnaburiaso de Babilonio la juna faraono plendas, ke la babilona princino promesita al lia patro ankoraŭ ne alvenis. Tiu ĉi respondis, ke la princino mortis pro kontaĝa malsano, sed ke ili ĉiam povas intertrakti pri alia princino. Tiam la faraono sendis grandulon al Babilonio, kiu certe estis Ejo, la saĝa viziro de Tebo. Manpleno da viroj vojaĝis kun nur kvin ĉaroj al Babilonio. Kiam ili alvenis, la reĝo de Babilonio koleriĝis. En tempo kiam senditaroj aperis en gastlando kun riĉaj donacoj, tiu ĉi povra senditaro el Tebo efikis kiel moka provoko sur Burnaburiaso. Li malliberigis Ejon kaj ties magran procesieton kaj sciigis al la faraono, ke tiu povra enkadriĝo de peto pri princino estas ofendo. Amikeco inter reĝoj estas nur konservataj per riĉaj donacoj.

Escepte de tiu letero ne ekzistas alia indiko, ke Amenotepo la IV-a havus haremon.

15. Ankaŭ la bopatro koleras

Dum Neferteta kaj Amenotepo ĝuis sian feliĉecon en la palaco de Melkata, ŝia patro en la fora Mitanio, estis tute ne kontenta. Ne plaĉis al Tusrato, ke li devis pagi du dotojn por unu filino. Tial li skribis riproĉan leteron al sia juna bofilo. Kiam Amenotepo la III-a sendis al li siajn geedzecajn donacojn, li senkulpigis sin pro tio, ke la donacoj ne estas pli belaj, sed promesis sendi multe pli post la alveno de sia novelzino. Sed Amenotepo la IV-a sendis malpli valorajn statuojn el ligno, kovritajn per oro. La senditoj de Tusrato tamen estis vidintaj, kiel Amenotepo la III-a igis gisi orajn statuojn.

«Mi ne scias, kial mi meritas tion,» reskribis plorema Tusrato.

Por emfazi sian malkontentecon, Tusrato tenas la egiptajn kurierojn kaptitaj en sia palaco, kie li intencas gardi ilin, ĝis la faraono estos plenuminta sian promeson. Li sendas du subalternajn oficistojn kun tiu mesaĝo al Tebo,

sen diplomataj donacoj, kio en tiu tempo estis terura ofendo.

Ĉu tio ĉi lasis Nefertetan indiferenta, aŭ ĉu ŝi respondecis pro tiuj ĉi kat-kaj-musa ludo? Apenaŭ la du senditoj alvenis en Tebo, ili estis maliberigitaj. Dum pluraj semajnoj okazis nenio. Tiam Tusrato sendis leteron, en kiu li memorigis Amenotepon la IV-an pri la amikeco inter Egipto kaj Mitanio. Li mem estis liberigonta la du egiptanojn, kaj petis liberigi siajn senditojn. La faraono respondis, ke du mitanoj kontraŭleĝe transiris la egiptan limon en Sirio. La duo estis kondukata antaŭ Neferteta, kiu parolis ilian lingvon, post kio la faraono igis meti ilin trans la limon, postulante, ke Tusrato punu ilin. Tusrato respondis, ke li punis, sed ne mortigis ilin.

16. La feliĉeco de la reĝino

Se oni rigardas la bildojn de la unuaj geedzecaj jaroj, kiuj montras Nefertetan kaj Amenotepon la IV-an kune, oni ne povas dubi pri tio, ke ilia geedzeco estis feliĉa. Delikata kaj sentema reĝo kiel Amenotepo kaj enami-ĝinta reĝino kiel Neferteta estis novaĵo por la egipta popolo.

Kvazaŭ ili sentus, kiel mallonge daŭros ilia feliĉeco, Neferteta kaj Amenotepo provis vidi nur la plej belan flankon de la vivo kaj ĝui ĝin. Ŝi ŝatis la naturon, la ekzotikan faŭnon. Ĉie ili konstruis parkojn kun maloftaj plantoj, kiujn sklavo alportis el la interno de Afriko post plurmonataj ekspedicioj. En artefaritaj lagetoj, kiuj devis alporti freŝecon, oni metis la favoratajn bestojn de Neferteta: orfiŝojn kaj anasojn.

Dum la tri unuaj jaroj de ilia geedzeco Neferteta metis tri infanojn, filinojn, sur la mondon: Meritata (*-1362), Meketata (*-1361) kaj Anĥesenpatona (*-1360). Por la edukado de siaj filinoj, Neferteta disponis pri vartistinoj, nutristinoj kaj servistinoj. Beboj kaj etuloj estis mamnutrataj ĝis la kvara jaro. La patrino ĉien portis sian bebon kun ŝi en longa tuko, kiu estis nodita sur la nuko, kaj en kiu la etulo kuŝis kvazaŭ en hamako antaŭ la patrino. Ĉar oni konas nenian tian scenon de Neferteta, kvankam ŝi estis sesobla patrino, oni rajtas supozi, ke Neferteta mem ne plenumis tiujn patrinajn devojn.

Ankoraŭ neniam faraono kaj lia edzino havis tiel intensan kaj demonstran familian vivon kiel Neferteta kaj Amenotepo. Kiam ili elrajdis sur sia ora parada ĉaro, ankaŭ iliaj filinoj estis

kun ili. La infanoj ĝuis grandan liberecon, kaj oni povas trovi ilin ie ajn en la palaco. Ilia ĉeesto ankaŭ ne ĝenis, kiam Amenotepo traktis ŝtataferojn kun siaj oficistoj. Dum la unuaj jaroj de ilia geedzeco Neferteta kaj Amenotepo ankaŭ ne ĝenis sin ĉirkaŭbraki kaj kisi sin en publiko – t.e. froti siaj nazojn unu kontraŭ la alia. Ke ili regis grandan imperion, ŝajnis esti kromafero.

La babilona reĝo Burnaburiaso skribis en letero al la faraono ion, kio jam de longe ne plu estis sekreto: «Niaj rilatoj fariĝis malvarmetaj. Ni ambaŭ alvenis al la sama vidpunkto, ke ni bezonas nenion unu de de alia; ĉiu el ni havas en sia propra lando ĉion kion li bezonas.» Amenotepo-Aĥnaton kaj Neferteta ekhavis ses filinojn. La tri aliaj filinoj estis: Nefer-Neferu-Atona (*-1358), Nefer-Neferu-Rea (*-1355) kaj Setepen-Rea (*-1353).

(Daŭrigota)

Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio

Pasintaj aktivaĵoj

Ĵaŭdon, la 27-an de novembro 2014:

Henri Schutters faris vojaĝon kun OKRA-Peer kiu daŭris tiel longe, ke li multe malfruis por la kvizo kiun li estis gvidonta. Nur tri personoj ĉeestis, kiuj agrable pasis la tempon sen kvizo, parolante esperante.

Ĵaŭdon, la 11-an de decembro 2014:

Ses personoj festis la 155-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof. La manĝaĵoj, trinkaĵoj kaj servo en la Toren-huis de Peer estis bonegaj. La etoso estis tre agrabla!

Estontaj aktivaĵoj:

Ĵaŭdon, la 29-an de januaro 2015:

Pieter Jan Doumen prelegos pri la vivo de la fama bela egipta reĝino Neferteta, edzi-no de la ne malpli fama Aĥnaton, faraono de 18-a dinastio, kiuj vivis en la 14-a jar-cento antaŭ Kristo.

Ĵaŭdon, la 26-an de februaro 2015:

Laŭ propono de Paul Hotterbeeckx ni tra-dukos anglajn kantojn en Esperanton. Do ne forgesu kunporti vian vortaron Espe-ranto-nederlanda-Esperanto! Se vi havas ankaŭ vortaron anglan-nederlandan, ankaŭ alportu ĝin!

Subtenu viajn kunklubanojn ĉeestante!

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

Paĝo 2:	Kolofono Redaktore...
	Historio de Esperanto en Belgio (4) (<i>E. D’Hondt kaj P. De Smedt</i>)
Paĝo 4:	Novaĵoj el Esperantolando: - Germanio: Artikoloj pri Esperanto (<i>Lu Wunsch-Rolshoven</i>) - Hungario: Kreu animacion, ludojn, rakonton (<i>László Szilvási, Ret-Info</i>)
Paĝo 5:	- Nederlando: Nova varbilo de UEA (<i>Osmo Buller</i>) - Pakistano: Ridetoj, ridoj, ridegoj (<i>Henri Masson</i>) - Togolando: AMO 7 en Lomeo, Togolando (<i>Stefan MacGill</i>)
Paĝo 6	Ĉu ni respondecas pro la varmiĝo de la klimato? (<i>Daniel Pignard</i>)
Paĝo 7:	Neferteta, la bela egipta reĝino (4) (<i>Philipp Vandenberg</i>)
Paĝo 10:	Aktivaĵoj de Limburga Esperanto

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supernacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratian solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatika heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. “Autant de langues on parle, autant de fois on est homme,” a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.